
N° 03 1965

G.L. GIMELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti



IFEA

# NEKROLOGO

Alia forta bato trafis nian movado ĝenerale, kaj I.F.E.A. aparte: la 1-an de julio 1965-a mankis al la amemo de iliaj gekaruloj kaj al la konsidero de la tuta esperantistaro, nia kara amiko:

D-ro Inĝ. Otello N A N N I

DELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO EN BOLOGNA - PREZIDANTO DE LA BOLOGNA KATEDRO DE ITALA INSTITUTO DE ESPERANTO - MEMBRO DE LA ESTRARO DE ITALA INSTITUTO DE ESPERANTO INTER KIES FONDINTOJ LI ESTIS, EN BOLOGNA DUM LA JARO 1913-a - NACIA KONSILANTO DE I.F.E.A. - FONDINTO DE LA BOLOGNA ESPERANTO GRUPO "A. TELLINI" - EKS ALTA FUNKCIULO DE ITALA ŜTATA FERVOJO - ORGANIZINTO, KIEL-VIC-PREZIDANTO, DE LA NACIA KONGRESO DE ESPERANTO DUM 1952-a - KOLONELO DE LA PIONIRARO (GENIO) - DISTINGITA PER BRONZA MEDALO PRO MILITA VALORO.

Li estis 73 jaraĝa, sed ankoraŭ juna laŭ aspekto kaj spirito.

La sciigo de la morto de Inĝ. Nanni tre konsternigis nin. La malĝoja signifo de tiu sortobato malfacile enpenetris en la cerbo de ni, kiuj dum jaroj fidele kunlaboris kun li: ĉu en la oficejaj taskoj dum la deĵoro ĉe Ŝtataj Fervojoj, ĉu en la Esperantaj organizaĵoj por la bono de nia fervojista movado kaj de la Bologna Katedro.

Li dediĉis la tutan vivon al familio, al profesia laboro, al Esperanto-Movado kaj al ĝiaj noblaj idealoj laŭ la Zamenhofa vojo. Li konis persone nian Majstron D-ron L.L.Zamenhof kaj havis daŭran korespondadon kun li ĝis lia morto. Li sin dediĉis al Esperanto ekde la jaro 1909-a, kiam li estis juna studento, kaj gvidis multegajn Esperantajn kursojn kaj prezidis ekzamen-komisionojn ĝis la lastaj monatoj, kvankam li estis jam malsana.

Li partoprenis ofte al niaj esperantaj kongresoj, kunvenoj kaj manifestacioj; pro tio li estis simpatie konata en la tuta esperantistaro; per sia profunda kono de nia lingvo li estis malavara konsilanto de ĉiuj esperantistoj. Li havis multegajn amikojn en Italujo kaj eksterlande, en kaj ekstere de nia movado; kune kun ni ili funebras pro la forpaso de tre kara amiko.

Ni kiuj partoprenis la enterigan ceremonion kaj sekvis lian ĉerkon sub la verda standardo akompanante la florkronon kiu reprezentis la kondolencojn de la Bologna Esperanto-Grupo kaj de Itala Fervojista Esperanto-Asocio, ni ideale reprezentis lian multnombran esperantan amikaron, kaj prenis la torĉon de nia mortinto por daŭrigi nian vojon por Esperanto.

Ni komprenas ke lia forpaso estas terura bato por tiuj kiuj postrestas, la edzino kaj la du gefiloj, kaj esperas ke la tempo iom post iom cikatrigos la teruran vundon. Ni sendas per tiuj linioj al ili sincerajn kondolencojn kaj esperas ke nia profunda partopreno iom mildigos ilian doloron.

Ankaŭ nia longjara fidela ano:

Amedeo F E R R I

el Voghera, mortis laste kaj ni esprimas al la familio kaj al la Vogheraj esperantistoj niajn kondolencojn.

## 17-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO EN HAMAR (NORVEGUJO)

Post longa, sed tre agrabla vojaĝo ni finfine atingis Oslo, la norvegan ĉefurbon, kaj mi sentis min kiel hejme, ĉar tie ni renkontis multajn eksterlandajn geamikojn. Post la vizito al la urbo, kaj precipe al tre interesa sed tre stranga (laŭ mia vidpunkto komprenebla) parko Vigeland kie nudaj statuoj montras la diversajn aspektojn de la tuta vivo de la homaro, ni kunvojaĝis al Hamar, nia 17-a kongresurbo. Ni tuj havis okazon trarigardi la landon kiu nin gastigis. Blankaj kaj ruĝaj lignodometoj staras inter la abioj kaj sur la verdaj deklivoj ekfloris blankaj printempaj steletoj. Idiliajn lokojn, ni trapasis: de unu flanko la lago Mjøsa, de la alia, la arbaro.

Dimanĉe matene okazis la solena malfermo de la 17-a I.F.E.F.-Kongreso en la bela salono "Teatret Festiviteten" de Hamar. Post ludado de belega Grieg honorsalutmarŝo flanke de la salonorĥestro, la Prezidanto de la L.K.K., Sro

Krogstie, salutis la kongresanojn kaj dankis la norvegajn instancojn, kiuj helpis kaj apogis la L.K.K. kaj citis la vortojn de L.L.Zamenhof dum la unua Esperanto-kongreso en Boulogne sur Mer en 1905 "Kunvenis ĉi tie ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj sed homoj kun homoj por starigi bazon de frata amikeco". Tiuj vortoj fariĝas ĉiam pli aktualaj ĉar pli kaj pli la mondo malgrandiĝas kaj la popoloj alproksimiĝas.

Belegan kaj taŭgan prologon de S-ro Eah deklamis S-ro Per Engen, poste la alta protektanto de la kongreso S-ro Saetersdal, Hamar-distriktĉefo, en la nomo de la "N.S.B." (Norvega Ŝtata Fervojo) kaj de li mem salutis la Kongreson.

La urbestro S-ro Aŭdensen post kelkaj salutvortoj en la nomo de la urbo, rimarkigis ke Esperanto kunligas fakte la popolojn kiel la reloj la landojn, kaj starigas homajn, amikajn rilatojn inter la popoloj.

S-ro de Jong malfermis la kongreson en la gastema Norvegujo kiu tiel bonvole kaj bonkore akceptis nin, pli ol 450 fervojistoj apartenantaj al 17 landoj

Poste fest-paroladis S-ro Støp-Bowitz prezidanto de Norvega Esperanta Ligo. Li unue parolis pri la kongresurbo kiu, situanta en la centro de ĉiuj trafikliniој, ludas ĉefan rolon en trafikaj, kulturaj, esperantaj fakoj kiel sidejo de Fervojista Muzeo, de fervojista riparejo, de sportaj instalaĵoj. Due li diris ke ju pli oni komprenas ke la homoj kiuj loĝas en proksimaj aŭ malproksimaj landoj estas faritaj el samsubstanco, des pli oni klopodas forigi la internacian tension. Pere de Esperanto ni povas starigi pli grandan interkompreniĝon per praktika laboro, kaj nur se ni samtempe atakas en multaj frontoj, ĉiuj komprenos ke Esperanto estas serioza afero.

Parolis poste la reprezentantoj de Fervojistaj kaj ne-fervojistaj asocioj -nome de la Norvegaj Sindikatoj, de Lokomotivistoj, de kontraŭ alkoolisma Asocio, de Evangelia religio. Fine post Esperanto-marŝo de Menzel, salutis la dekseplandaj Delegitoj laŭ alfabeta ordo.

Post la salutoj de la gvidanto de la junulara fako, D-ro Imre Ferenczy, de la Prezidanto de la urba esperanto-klubo "Norda Stelo" de la reprezentantoj de S.A.T., K.E.L.I, I.K.U.E., la solena inaŭguro de la Kongreso finiĝis per komuna kantado de "La Espero".

En la sama tago, posttagmeze, okazis vizito al Norvega Fervoj-muzeo fondita en 1896 por montri la evoluon de la norvegaj fervojoj tra la jaroj. En la granda muze-teritorio troviĝas kompleta malgranda fervojo, tricent metroj da relparo kun signaloj, tri stacioj unu el kiuj montras staciestran hejmon kun mebloj kaj petrollampoj. Ankoraŭ ripozdomoj, kiosko, kaj granda vagonhalo en kiu staras veturiloj por mallarĝa trako, lokomotivoj kaj vagonoj por larĝa trako. Ni vidis la modelon de la fama "Raketo" de Stephenson, donaco de la Brita Fervojo al Norvegujo okaze de la centjara jubileo de "N.S.B.". En la ekspoziciejo ni vidis la arĝentan fosilon kaj radportilon per kiu la iama vicreĝo malfermis la unuan fervoj-konstruadon en 1851. Ankoraŭ originalajn desegnaĵojn de Robert Stephenson, ilojn kaj multajn obiektojn uzitajn dum la fervoj-konstruado, kaj grandan modelon de la Bergen-fervojo kaj Flåmfervojo ĉe Mirdal. Eble mi forgesas aliajn interesajn vidindaĵojn, sed pensas ke la ĉefajn, mi memorigis.

Lundo matene okazis la unua kunveno de I.F.E.F.-Komitato. La debato tuŝis diversajn vidpunktojn, por ĉiu el kiu okazis voĉdono. Oni decidis sendi telegramon al S-ro Jonas urbestro de Vieno kaj esperantisto, kiu fariĝis nun Prezidanto de Aŭstria Respubliko.

Posttagmeze jen la unua ekskurso al Elverum ĉarma urbeto proksime al Hamar. Tie post la inaŭguro de la unua "Esperanto Strato" en Norvegujo ni vizitis la Glåmdalmuzeon: Belega subĉielmuzeo kiu montras lignajn malnovajn domojn, kuŝantajn inter abioj kaj arĝentaj betuloj apud la Glåm rivero.

Marde matene: dua kunveno de la komitato en la belega salono de la ŝparkaso "Vangs Sparebank", kaj posttagmeze renkonto de la terminara komitato. Je la 16,45 fakprelego de S-ro Per Engen, kiu pritraktis la novajn vartarifojn ĉe la Norvegaj Fervojoj. Vespere okazis la lasta kunveno de la komitatanoj.

En la belega salono "Teatret" okazis ankaŭ la kultura kaj teatra vespero. Sub la gvidado de S-ro Nomerstad la orkestro ludis Polonezon kaj norvegajn melodiojn kaj la Hamaraj gedancistoj, norvegajn popoldancojn inter la lampoj

de la fotografaparatoj. S-ro Karterud tiel bonege recitadis "Bergliot" (de Bjørnstjerne Bjørnson, Nobel premiito) ke ĉiuj la aŭskultantoj je liaj lipoj pendis, kaj tondre aplaŭdis: laŭ la norvega dramo lia recitado estis kvazaŭ substrekita de klavermuziko. Tiujn aplaŭdojn meritis ankaŭ la geaktoroj kiuj rolis "Morto de patrino Aase" el Peer Gynt de Ibsen: kaj kiel ĉiuj belaĵoj ankaŭ tiu vespero finiĝis.

Merkrede matene ni boat-ekskursis sur la lago Mjøsa ĝis la urbo Gjøvik. La suno brilis, sed la troa vento ĝenis iomete multajn homojn kiuj preferis resti, dum la tuta transiro, en saloneto, dume la kuraĝuloj ĝuisla sunon kaj lalagon. Dum niaj karegaj delegitoj partoprenis la unuan laborkunsidon, la virinoj vizitis la vendejojn, kaj profitante la laboron de la edzoj, elspezis iliajn ŝvitintajn ŝparojn, certe de ilia pardono ĉar ilin estus renkontantajn, nur tuj antaŭ la kongresa balo, kiu kiel kutime, gaja kaj amasplena ne permesus grumblojn aŭ riproĉojn.

Ĵaŭde matene ni vizitis la imponajn ruinojn de la malnova Katedralo de Hamar dum niaj edzoj partoprenis la duan laborkunsidon. Per unuanima aplaŭdo Ĉeĥoslovakio fariĝis 19-a I.F.E.F.-Sekcio. La fervojista blovorkestro ludis muzikon dediĉita al Esperanto movado en la Katedral-ruinoj.

S-ro Naess el Trondheimo prezentis tri filmojn pri Norvegujo. Li mem tradukis la vortojn kiuj akompanis la filmojn, kaj per streĉa penado forstrekis de la sonbendo la norvegan elparolon kiun li anstataŭis per sia en Esperanto, kaj intermiksis kun taŭga muziko. Tiuj filmojn konigis al ni la landon en ĝiaj vestoj printempa kaj vintra, ambaŭ ĉarmaj ambaŭ allogaj. Koncerto en la nova Katedralo finis belege tiun tagon.

Jen la lasta tago de nia kongreso. Finitaj la laborkunsidoj, finitaj la debatoj jen ĉiuj aŭtobusveturantoj al Lillehammer. Lillehammer: belega urbeto inter la lago kaj la montoj: gaja ripozloko kun larĝaj stratoj kie okulumas invitantaj montrofenestroj; kie la popolmuzeo riĉa de trezoroj de la pasintaj jarcentoj, atestas la historionkaj evoluon de la norvega popolo. Jes, la norveganoj estas, laŭ mi, kiel iliaj lignaj dometoj: mienoj severaj, seriozaj, silentemaj, iom rigardemaj: sed kiam ili komprenas esti inter amikoj, ili prezentas sian duan aspekton: gajecon kaj fratecon. Ilia ĝentileco povas esti vere komparata al tiu de Hungaroj kaj Hispanoj, kiel iliaj domoj interne montras trezorojn el kupro aŭ peltro aŭ porcelano.

Bedaŭrinde estis la lasta tago de la kongreso kaj en la subĉiela teatro post muzikoj kaj dancoj folkloraj la Prezidanto de Jong fermis la Kongreson. Ni forlasis Lillehammer kaj anstataŭ reveturi tuj al Hamar, la aŭtobusoj grimpis ĝis Siusjoën. tie la neĝo ankoraŭ kovris la ĉirkaŭantan montaron kaj tuŝetis dolĉe la deklivon kie ni haltis: iom pli malproksime lageto okulumis inter la glacio kiu lin duonkovris. Ĉiuj desaltis el la aŭtobusoj kaj tuj ni estis inter fervora batalo: la manoj plenplenaj da neĝo, junuloj kaj nejunuloj fariĝis infanoj. Buloj kruciĝis kaj fandiĝis sur niaj dorsoj, sur niaj kapoj klinigitaj. Sed la tempo forflugis kaj ni ridantaj kaj ruĝaj devis reveni al la aŭtobusoj. Ni atingis Hamar kaj tie la adiaŭo estis pli ol kutime melankolia: ĝis revido geamikoj, ĝis venontjare al Utrecht.

DELVINA GIMELLI - BOLOGNA (Italujo)

## ALTA DISTINGO POR NIA I.F.E.F.-PREZIDANTO

Nia kara amiko S-ro K.G.J. de Jong, teknika inspektoro ĉe Nederlandaj Fervojoj, Prezidanto de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, estis honorigita de Ŝia Reĝina Moŝto Juliana de Nederlando per la ordeno de "Ridder in de Orde van Oranje Nassau" (Kavaliro en la Ordo de Oranje Nassau).

La transdono de la ordenaj insignoj okazis la 29-an de aprilo 1965 en la granda kunvenejo de la Centra Stacidomo en Amsterdam fare de la Direktoro de la Norda-Okcidenta Fervoja Distrikto.

Sendube ankaŭ lia laboro por la Fervojista Esperanto-Movado kontribuis al tiu honorigo. Pro tio ni estas aparte fieraj kaj ĝojaj pro tia distingilo kiu premias nian elstaran kolegon kaj prezidanton. Koregajn Gratulojn al li flanke de Itala Fervojista Esperanto-Asocio.

## FRANZ JONAS - PREZIDANTO DE AŬSTRUJO

Nia eminenta samideano S-ro Franz Jonas, urbestro de Vieno kaj malnova multmerita aktiva esperantisto, estis elektita Prezidanto de la Aŭstria Respubliko.

Mi havis la honoron esti akceptita de Li dufoje, gvidante delegacion de Italaj fervojistoj-esperantistoj, dum la jaro 1956, okaze de la Viena Fervojista Esperanta Feriosemajno; kaj dum la jaro 1959 okaze de la postkongreso en Vieno post la 11-a I.F.E.F.-Kongreso en Linz.

Mi memoras ke en ambaŭ la okazoj S-ano Jonas kaj Sia estimata edzino afable konversaciis kun ni. Ni sendas al Li per tiuj linioj varmegajn gratulojn.

p.i. Germano Gimelli - Sekretario de I.F.E.A.

## VIZITO AL ĈEĤOSLOVAKIO DE BOLOGNAJ FERVOJISTOJ-ESPERANTISTOJ

Organizita de Bologna Postlaboreja Klubo "Dopolavoro Ferroviario" kun la helpo de Ĉeĥoslovakaj Sindikatoj, okazis de la 13-a ĝis la 21-a de junio vizito al Ĉeĥoslovakio fare de Itala karavano de Fervojistoj. Inter la gepartoprenantoj estis ankaŭ la Sekretario de I.F.E.A. kun kelkaj membroj de la Asocio. La esperantistoj estis simpatie surprizitaj pro la frata akcepto ricevita sur la perono de la ĉefa stacidomo de Praha, kie Ĉeĥaj Fervojistoj-Esperantistoj, inter kiuj Inĝ-roj Kràl, Řebiček, Holý kaj S-ro Železny, donacis al ili bukedon de floroj kaj gvidilojn de Praha kaj de Ĉeĥoslovakio.

Dum la ekskurso, krom Praha, ni vizitis Lidice, Karlstein, Konopiste kaj Pilzen: ankaŭ en tiu ĉi lasta urbo ni havis kontakton kaj akompanon flanke de lokaj esperantistoj.

Vere en Ĉeĥoslovakio ni pasis de surprizo al surprizo ĉar krom la konatajn esperantistojn ni konis surstrate, en muzeo kaj alie, esperantistojn kiuj, aŭdante nian inter-babiladon, deziris koni kaj helpi nin.

La ekskurso estis por ni ĉiuj neforgesebla kaj la belega kaj gastama Praha multe plaĉis al ni; grandan impreson vekis en la neesperantistoj, la afableco per kiu Ĉeĥaj gesamideanoj akceptis kaj helpis nin.

## E S P E R A N T A J   M A N I F E S T A C I O J

### P A R M A - 16-a de majo

En la salono de la Filozofoj de la Universitato, okazis la inaŭguro de la nova sidejo de la Parma Esperanto-Grupo, titolita al neforgesebla Prof-ro Giorgio Canuto, eks-Rektoro de la Universitato mem, kun la ĉeesto de liaj gefamilianoj, de la urbaj autoritatuloj, kaj de la estraro de F.E.I.

Malfermis la manifestacion la Prezidanto de la Parma Esperanto-Grupo adv. De Rensis, kiu laŭdegis la agadon de la plejplorata profesoro, kuracisto, poligloto, esperanta pioniro, Prezidanto de F.E.I. kaj de U.E.A., kaj mallonge skizis la vojon de la esperantisto kiu donis siajn tutajn fortojn al la venko de la Zamenhofa idealo. Oficiala preleganto estis Prof-ro Agostini, Ĝenerala Direktoro de Itala Instituto de Esperanto. Li memorigis Prof-ron Canuto pri lia ekvilibro de spirito, de humoro, de inteligenteco kaj de Koro; kiel li mem diris, li multe profitis de lia ekzemplo, de lia konsilo kaj de liaj kuraĝigaj vortoj. La oratoro diris ankaŭ al la ĉeestantoj ke Esperanto ne estas aspiro de malmultaj, sed vera realeco kiu sukcesas ĉiam pli.

Laŭ la programo oni vizitis, post komuna tagmanĝo, la urbon kaj la lokojn rilatantajn al la vivo de Giuseppe Verdi, la fama komponisto.

### M O D E N A - F O R M I G I N E - 23-a de majo

Tie okazis, organizita de la Modenaj esperantistoj, la 4-a Interregiona Esperanta Kunveno. La esperanta manifestacio inaŭguris, laŭ la deziro de la Urbestro de Formigine, la novan Komunuman Salonegon.

Matene oni ĉeestis la projekcion de la Esperanta Filmo, realigita pere de la propaganda Oficejo de F.I.A.T., la fama aŭtomobil-fabrikejo el Torino. Tiu ĉi filmo vekos gravan intereson rilate al Esperanta Propagando, ĉar estos sendota en ĉiu lando el la mondo, kaj ĝi estas parolata nur Esperante.

Posttagmeze okazis premiado de la venkintoj de la Internacia Konkurso pri Esperanta Literaturo "Kastelo de Formigine". Ankaŭ ĉi tie la Italaj Fervojistoj montris sian lertecon ĉar du anoj de nia I.F.E.A. gajnis premion; nome

la duan premion (arĝentan medalon) S-ro Gianluigi Gimelli pro originala Poezio en Esperanto titolita "Bluvo kaj memoro" kaj S-ino Giuseppina Gamberini kiu ricevis ekstrakonkursan bronzan medalon pro la poezio "Amikeco".

La tre gaja tago finiĝis per amuza "Trezor-ĉaso" kun multnombraj belaj premioj, kiu interesis ne nur la esperantistojn ludantajn, sed ankaŭ la tutan loĝantaron de Formigine.

Jen la poezio kiu gajnis duan premion: PLUVO KAJ MEMORO

Vi plaĉas al mi
pluvo,
fratino mia,
kun la bonodor'
de ter' malsekiĝinta,
kaj la de longe
malklare alvenanta
grumblo de l'tondro.
La forglitanta brilo
de l' fulmo
kaŝas nuntempon
kaj mi rememoras . . .
Mi pensas
al pasintaj
strangaj aferoj,
kaj la memor' de juneco
sola,
tro sola
al mia menso revenas.
Kie mi estis,
en kiu domo,
en kiu ĉambro,
sur la bordo de kiu fenestro
mi antaŭeniĝis knabeto
kaj ploris?
Gutoj de pluvo
kaj larmoj
sur mia vizaĝo
same
kiel tiam . . .

GIANLUIGI GIMELLI

F E R R A R A - 24-a de majo

La Bolognaj Esperantistoj kunvenis multnombraj en Ferrara por la inaŭguro de la sidejo de la Esperanto-Grupo. La Ferraraj gesamideanoj geesperantistoj trovis malavaran gastamon ĉe la sidejo de Eŭropa Federalista Movado en Corso Giovecca 47. Por la bonsukceso de la manifestacio multe klopodis nia membrino F-ino Mercedes Poli de Ferrara. Faris festparoladon nia junulo Paŭlo Fantuz.

SAN BENEDETTO DEL TRONTO - 30-a de majo

Al la tre bela Esperanto-manifestacio en San Benedetto del Tronto partoprenis multnombraj autoritatuloj, inter kiuj la Provincestro, La Urbestro, la Policestro kaj la Prezidanto de la Turisma Entrepreno. Okazis la disdono de la diplomoj al la gelernantoj de du Liceoj, kiuj ĉeestis la esperantan kurson, feliĉe gvidata de la Prof-ino Lina Gabrilelli.

La vojaĝo estis longa, sed la Bolognaj Fervojistoj-Esperantistoj ne malantaŭeniris antaŭ tiuj malfacilojôj kaj estis feliĉaj partopreni al tiu ĉi mirinda manifestacio. Nia kasisto S-ro Catena havis okazon paroli dum tiu bela ceremonio kie reprezentis krom nia Asocio ankaŭ F.E.I.

Post sportaj kaj amuzaj prezentadoj la renkontiĝo finiĝis per dancfesto honore al la novdiplomitaj esperantistoj.

VILLAFRANCA DI VERONA - 29-a de junio

Malgranda grupo da Bolognaj Esperantistoj-Fervojistoj partoprenis la 29-an de junio la 1-an interregionan kunvenon en Villafranca de Verona. Celo de tiu ĉi kunveno estis ne nur la inaŭguro de nova strato titolita al "Esperanto", sed ankaŭ amika, frata renkonto inter esperantistoj. Multnombraj la partoprenintoj de pli malpli proksimaj urboj.

Post la festparolado en la teatra salono, fare de Pro-ro Fabris, ĉiuj kune partoprenis la solenan inaŭguron de la strato "Esperanto" kun la ĉeesto de la urbestro kaj de aliaj autoritatuloj. La manifestacio, antaŭvidita Nacia, fariĝis Internacia pro la ĉeesto de Danaj geedzoj Frijs niaj malnovaj geamikoj, kiuj portis la saluton de la danaj esperantistoj kaj malkovris simbole la novan tabulon de "Esperanto" strato.

Posttagmeze en premikonkurso la tri bolognaj fervojistoj-esperantistoj kune kun aliaj geamikoj gajnis valorajn premiojn, kaj ankaŭ arĝentan pokalon per la plej malproksima grupo. Post vizito al tre interesa Muzeo de la Restariĝo, (nome al la domo kie renkontiĝis la Imperiestroj Napoleono la III-a kaj Francisko Jozefo en julio 1859 por kondiĉi la pacon, kiu pro tio estis nomata "Paco de Villafranca"), kaj al la Foiro de Sankta Petro, ĉiuj revetuvis al propraj urboj.

## GEEDZIĜO - ORANĜ-FLOROJ

La 3-an de julio okazis geedziĝo de nia ŝatata membro S-ro p.i. Giovanni Gilardi el Genova kun F-ino Maria Grazia Zanetti el Trieste. Ni ankaŭ je la nomo de la tuta estraro kaj anaro de I.F.E.A. sendas al novaj geedzoj la plej varmajn bondezirojn pri longa kaj feliĉa vivo.

## 36° CONGRESSO ITALIANO DI ESPERANTO - RIMINI, 18-23/9/1965

Il programma provvisorio del Congresso é il seguente:

Sabato 18 Distribuzione documenti-Interkona Vespero-Conferenza stampa.

Domenica 19-S.Messa-INAUGURAZIONE SOLENNE (Teatro Novelli)-Fotografie.
pomeriggio-Assemblea generale F.E.I., elezione nuovo Consiglio-Concorso di oratoria in Esperanto-Convegno annuale dei Ferrovieri Esp.
serata Sagra dell'Uva (con inizio nel pomeriggio e chiusura alle 24).

Lunedì 20 Lavori congressuali-Riunioni di categoria (I.L.E.I.-I.I.E.). Conferenza pubblica: "L'Esperanto nelle scuole".
pomeriggio-Gita a Gradara: rievocazioni dantesche, Premiazione del concorso di oratoria in Esperanto.
serata Festa danzante con elezione di Miss Esperanto 1965.

Martedì 21 Trasferimento del Congresso a RAVENNA, in pullmann-Lavori congressuali nella Sala dantesca della Biblioteca Classense-Conferenza pubblica: "Dante e la lingua italiana; Zamenhof e la lingua Internazionale". Omaggio della Divina Commedia in E. al Sindaco di Ravenna e al Presidente dell"E.P.T.-Omaggio alla Tomba di Dante-Pranzo in comune sul Porto Corsini. Visita ai monumenti danteschi in città ed esterni. Ricevimento dal Sindaco con le Autorità locali. Serata: Concerto d'organo in S.Vitale.

Mercoledì 22-Continuazione e chiusura dei lavori congressuali-Riunioni di categoria (Cattolici Esperantisti-Gioventù Esperantista).
Pomeriggio-Visita al Museo internazionale delle Ceramiche a Faenza ed a Bertinoro, paese dell'ospitalità. Serata libera.

Giovedì 23 TUTTAGA EKSKURSO a San Marino-Ricevimento delle Aùtorità-Visite-Folklore-Pranzo in comune. Ritorno a Rimini ore 17.

QUOTE DI ISCRIZIONE/ Soci FEI £.2400=Familiari e studenti £.2100=Non soci FEI, Enti, Associazioni £.3300=Ciechi e Stranieri senpage.

Indirizzo del Congresso: 36° CONGRESSO ITALIANO DI ESPERANTO-AZIENDA AUTONOMA DI SOGGIORNO E TURISMO - RIMINI.

F.I.A.T.- TERO, MARO, ĈIELO estas la titolo de la laste eldonita prospekto en Esperanto, kiu per pluraj paĝoj kaj koloraj bildoj prezentas kompletan panoramon pri produktoj kaj fabrikoj FIAT en la mondo. Stoko de tiuj prospektoj estas sendita al ĉiuj esperantistaj landaj asocioj por disdono inter la membroj. Unuopaj interesuloj povos peti la prospekton rekte ĉe sia landa asocio aŭ al: Direzione Stampa e Propaganda FIAT-Corso Marconi 10 Torino It.

KOLORFILMO KUN ESPERANTO-SONORO ankaŭ eldonita de FIAT, pritraktas la projektadonkaj provadon de la lasta aùtomobilo modelo "850". Esperantistaj instancoj kiuj deziras utiligi la filmon, estas petataj mendi ĝin al la supre nomita adreso kaj precizigi la preferatan formaton (8 mm. 16mm. aŭ 35 mm.).

## E S P E R A N T O E N L A R A D I O

RADIO ROMA -ESPERANTO - Casella Postale 320 ROMA (Italia) - Jaro 1965-a
La dissendoj okazas de h.17,35 ĝis h.17,50 (M.E.T.)- Ondlongoj: metroj 25,20 = Mc/s. 11,90, metroj 31,33 = Mc/s. 9,57. Redaktoro: Luigi Minnaja

AŬGUSTO 1965-a: 2007 dimanĉon la 1-an: Italaj verkistoj: Antonio Fogazzaro-2008 dimanĉon la 8-an: Romaj preĝejoj: S.ta Georgo en Velabro - 2009 dimanĉon la 15-an: Gondoloj sur la Venecia Laguno - 2010 dimanĉon la 22-an: Leterkesto - 2011 dimanĉon la 29-an: Kristana mondo.

La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto"; la unua parto al la indikataj temoj.

RADIO ROMA - ESPERANTO-FAKO